

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Javier Alcalde

Monique Arnaud

Florina Caragea

Martine Demouy

Klaus Friese

Irina Gončarova

Mireille Grosjean

Hori Jasuo

Marija Jerković

Koffitche Koufionou

Katalin Kovats

L. Lu Wunsch Rolshoven

Jean Bosco Malanda

Patrick Manirakiza

Gilbert Ndiokubwayo

Germain Pirlot

Martin Ptasiński

Jean-Claude Roy

Renée Triolle



ESPERANTO
+ EDUKADO
53-a ILEI-KONGRESO

KEBEKURBO
25 JULIO -
1 AŬGUSTO 2020



ilei

ENHAVO

Enkonduko (Mireille GROSJEAN)	3
Germain PIRLOT: <i>Kunlaboro kun AEDE (EAI)</i>	4
Javier ALCALDE: <i>Esperanto kaj sociaj sciencoj</i>	7
<i>Programo „Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneano en la tuta mondo”</i>	10
<i>Kvartaga kurso Instruista Trejnado (EIT) en Bujumbura</i>	15
Mireille GROSJEAN: <i>Piaget ne atingis Afrikon</i>	16
<i>Raporto de ILEI-delegitoj pri la Ĝenerala Konf. UNESKO 2019 (M. ARNAUD)</i> ..	18
<i>Ĉefaj decidoj de la 40a Ĝen. Konf. / Monda Raporto pri Edukado (R. TRIOLLE)</i> .	22
<i>Gravaj kaj ne gravaj punktoj por la Ligo (Mireille GROSJEAN)</i>	24
<i>La 60-a Internacia Esperanto-Sumoo (HORI Jasuo)</i>	22
<i>Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI – parto III. (M. GROSJEAN)</i>	25
El la landoj kaj sekcioj (DE, CD, HR, NL)	27
Jean-Claude ROY: <i>Mia deziro por 2020 kaj por la 20-aj jaroj</i>	33
La 53-a ILEI-Kongreso en Kanado – pliaj informoj	34
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj, adresaroj de funkcioj.....	38

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Mireille GROSJEAN „Mirejo”, Grand-rue 9, cp 9, CH-2416 Les Brenets, Svislando. <mirejo.mireille@gmail.com>. Tel. hejma (+41) 32 932 18 88, portebla (+41) 79 69 709 66. Kunordiganto de la estrara laboro. Eksteraj rilatoj (UNESKO, FIPLV kaj aliaj). Informado pri la Ligo. Observanto de ILEI en la estraro de UEA kaj Komitatano A ĉe UEA. Eldonado de la du revuoj de ILEI.

Vicprezidanto: Ivan COLLING, DEPAC/UFPR, Ed. Dom Pedro I, Rua Gal. Carneiro, 560, Primeiro. Andar, Centro, BR-80060-150, Curitiba, PR, Brazilo. <iecolling@yahoo.com.br>. Eldonado de la Manlibro pri Instruado de Esperanto

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. fiksa: (+7) 8352-648531, portebla: (+7) 919-670-25-34. <lena_espero@mail.ru>.

Estrarano pri financaj aferoj: William HARRIS „Vilĉjo”, 4 Edgecomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Tel. hejma (+ 510) 653 0998.

Vic-prizorganto de financaj aferoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, Tel. poŝ.: (+374) 055-27-99-06. <karinko_arm@mail.ru>

Estrarano: JUNG Yuro „Unika”, 101, Bonuru-Musashi, 9-11, Asahicyou 3, Kawagoe, Saitama JP-3501126, Japanio. Tel. poŝ.: (+81) 70-5569-6771. <yurjun@st.amu.edu.pl>. Reta komunikado, kongresaj aferoj, TEJO.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. hejma (+381) 32 371053. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Universitata agado, Eŭropa komisiono de UEA, AEDE.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,

Usono, University of Hartford;

AdE¹

Membroj:

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iona Koutny, Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

¹ AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo: La emblemo de la ILEI-Kongreso montras supre maldekstre la flagon de la provinco Kebekio kaj sube dekstre la flagon de Kebekurbo.

Sur la dorskovrilo: Esperanto en Kroatio (vd p. 29).

Enkonduko

Karaj legantoj,

2020 estu feliĉa jaro por ni ĉiuj, kuraĝa jaro laŭ la agado de Hector Hodler, kiu mortis en 1920.

Mi faras la unuan paŝon: I1, I2, I3 povus esti la tri niveloj de nova sistemo de ILEI por diplomi geinstruistojn. I1 estus la Unua Nivelo, estus por „kursgvidantoj” kaj trovus inspiron en nia malnova programo „Flugiloj de facila vento”. Ĝi estus enkonduko en pedagogion kaj ebligus al la kursgvidantoj ricevi dekhoran bazan kurson pri metodiko. Eĉ sen tia kurso la entuziasmaj estoj instruas, kaj mi ne povas imagi, ke ILEI estus policisto kaj malpermesus tion. Tia kurso povus aperi inter aliaj eventoj en la programo de la Somera Esperanto-Studado (SES) kaj IJK, la Kongreso de TEJO. I2 estus jam pli postulema lertigado por „instruistoj”. I3 estus altnivela studado, por „instruistoj”, same kiel ĝi nun ekzistas sub la nomo EIT: Esperanto Instruista Trejnado, kiu alportis (-os) al ni kvin novajn diplomitajn gekolegojn. Ĉiuj tri I por Instruistoj devus esti akireblaj en modula formo.

Vi ĉiuj, inkluzive la estraro de ILEI, aŭdas tion je la unua fojo. Bonvole komentu! Ĉu mia propono plenumas bezonon aŭ ĉu ĝi estas netaŭga?

En atendo elkore salutas

Mireille GROSJEAN

Prez de ILEI

KUNLABORO KUN AEDE (EAI)

de Germain PIRLOT, em. instruisto pri historio kaj la franca en mezgrada lernejo

Kiam mi eklernis Esperanton en la jaroj 1970-aj, mi jam estis membro de AEDE (*Association Européenne Des Enseignants – Eŭropa Asocio de la Instruistoj*) kaj partoprenis kelkajn renkontiĝojn. Mi parolis pri Esperanto interalie al lernejestro de Hannut (Belgio), kiu estis unu el la organizantoj de la jara Eŭropa Semajno. Li mem proponis, ke Esperanto estu unu el la laborlingvoj apud la franca, la germana kaj la nederlanda. Tion mi diskonigis al esperantistaj instruistoj kaj partoprenis deko, i.a. unu el Britio, sen iu ajn problemo. La sekvantan jaron, tiu semajno okazis en Freiburg (Germanio) sed, malgraŭ antaŭavertoj, du „verdstelaj misiistoj” kondukis sekte kaj tedeĝis la aliajn partoprenantojn per senĉesaj klopodoj por esperantigi ilin. Konkludo: pro la multaj protestoj, la Eŭropa Semajno pluiris sen Esperanto!



Tiam mi havis bonegajn kontaktojn kun s-ro Camille Kech, ataŝeo ĉe la franclingva Ministerio pri Edukado kaj eŭropa prezidanto de AEDE. Li petis starigon de tradukreto pere de Esperanto por informoj, kiujn de tempo al tempo li devis dissendi al landaj sekcioj. Mi sciigis tion al la estraro de ILEI, kiu rifuzis kunlabori pro strangaj kialoj! Tiam, kiel AEDE-ano, mi funkciigis tian reton, al kiu kunlaboris esperantistaj kolegoj el kelkaj eŭropaj landoj.

Alia peto de s-ro Kech estis kunlaboro kun ILEI. Tiurilate estis semajnfina kunveno en Parizo de kvar reprezentantoj de AEDE kaj kvar de ILEI: James Fairbank (Francio), Grahame Leon-Smith (Britio), Claude Piron (Svisio) kaj mi mem. Ni trafis kontentigan rezulton, sed, tiam, la estraro de ILEI aldonis nepran kondiĉon: ke Esperanto estu LA ununura laborlingvo por ĉiuj rilatoj inter la du asocioj! Tiel finiĝis la rilatoj inter AEDE kaj ILEI. Ankaŭ mi malaniĝis de AEDE kaj de ILEI dum pluraj jaroj.

En la jaroj 2010 mi reaniĝis al AEDE kaj al ILEI. Laŭokaze, mi mallonge ekinformis dulingve (en Esperanto kaj en la franca) pri Esperanto en rilatoj kun la lerneja medio. Respondis silento dum pli ol du jaroj. En 2014 mi estis kontaktita de AEDE-estrarano, emerita lernejestro kaj eŭropa prezidinto de AEDE, por verki artikolon pri Esperanto. Ni havis tuttagan renkontiĝon kaj

la unua artikolo pri Esperanto estis publikigita en la trimonata informbulteno de la sekcio, sub la titolo „*Regards sur l'Europe 10 – Dossier Germain Pirlot – Si tous les gars du monde chantaient le même refrain*” [Rigardoj sur Eŭropo 10 - Dosiero Germain Pirlot - Se ĉiuj infanoj en la mondo kantus la saman refrenon] (jan.-febr.-marto 2015, p. 4-12 <http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-2015-03.pdf>).

En la komenco informoj temis PRI Esperanto, ekzemple: „*Oostende, 17-25 juillet 2015 – 48e Conférence de l'ILEI*” [Oostende, 17-25 julio 2015 – 48-a ILEI-Konferenco] (julio-aŭg.-sept. 2015, p. 17 <http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-09-2015.pdf>). „*Buchanan MasterClass du 16 au 18/03/2016 à Liverpool*” (okt.-nov.-dec. 2015, p. 12 ... en la angla! <http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-2015-12.pdf>).

Alia estis: „*1. Poursuivons d'abord notre découverte du monde de l'Espéranto avec Herzberg am Harz – la ville de l'espéranto - 2. Appréhender la réalité d'un monde scolaire qui nous est étranger sans la barrière des langues est un énorme avantage auquel nous fait participer G.Pirlot. L'Ecole en Finlande: Stop ou encore?*” [1. Unue ni daŭrigu nian eltrovon de la mondo de Esperanto kun Herzberg am Harz - la urbo de Esperanto - 2. Koscii la realon de lerneja mondo, kiu estas fremda al ni sen la lingva baro, estas grandega avantaĝo al kiu G.Pirlot aperceptigas nin. Lernejo en Finnlando: Stopo aŭ ankoraŭ?] (jan.-febr.-marto 2017, p. 15-18 <http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BImars2017-AEDE.pdf>).

Je la fino de 2016 estis artikolo pri ILEI: *Des profs motivés qui souhaitent communiquer leur passion! Créée en 1949, l'ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), ou „Ligue Internationale des Enseignants Espérantistes*” [Motivigitaj instruistoj, kiuj volas komuniki sian pasion! Fondita en 1949, ILEI] (okt.-nov.-dec. 2016, p. 16-17 <http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-2016-12.pdf>).

Alia fazo estis, laŭ peto de la redaktistino, informoj pri instruado en eŭropaj landoj arigitaj PER Esperanto dank'al gravega kaj afabla kunlaborado de ILEI-anoj. Ekzemple „*Surveiller, éduquer: avec quel „pion” dans le système européen?*” en Albanio, Ĉeĥio, Finnlando, Litovio, Pollando, Serbio, Svedio, Svislando [„Kontroli, eduki: kun kiu ‘prigardanto’ en la eŭropa sistemo? (julio-aŭg.-sept. 2017 http://www.aede-el.be/uploads/documents/BI/BI-sept2017-AEDE_OK.pdf). Alia estis pri la instruado de lingvoj en Eŭropo: „*Et ailleurs? Une fois de plus, grâce à notre fidèle collaborateur Germain Pirlot et ses collègues du réseau international*

(et universel devrais-je dire) de l'espéranto, nous avons accès à des informations venant de nombreux pays. Celles-ci permettront de comparer entre eux les différents systèmes d'enseignement des langues étrangères” [Kaj aliloke? Denove, danke al nia fidela kunlaboranto Germain Pirlot kaj liaj kolegoj de la internacia (kaj universala, mi dirus) Esperanta reto, ni havas aliron al informoj de multaj landoj. Ĉi tiuj ebligas kompari la malsamajn sistemojn de fremdlingva instruado] en Albanio, Ĉeĥio, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Irlando, Italio, Hispanio, Kroatio, Litovio, Pollando, Slovakio, Svislando, (aprilo-majo-junio 2018, p. 16-24 <http://www.aede-be/uploads/documents/BI/BI-2018-06.pdf>).

Post kvin jaroj de tiaj informoj PRI kaj PER Esperanto, ĉiuj legantoj de la AEDE-informbulteno, reta kaj papera, havas alian ideon pri la utileco kaj la ebloj de tiu lingvo por internaciaj rilatoj. Neprus klopodi same kunlabori kun aliaj landaj sekcioj de AEDE. Tamen mi iomete bedaŭras, ke estas ankaŭ kelkaj eŭropaj landoj, kie mi ne sukcesis trovi kunlaborantojn! Ne malofte la informanto arigas sciigojn pere de landa(j) instruisto(j), kiu(j) ne estas esperantistoj. Mi supozas, ke eblus samkunagadi kun ne-esperantistaj instrumedioj alilande, alikontinente.

Alia taŭga kunagado estas la internacia konferenco, kiu okzis kadre de la ILEI-kongreso en Serbio en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj kun tri laborlingvoj: Esperanto, la serba kaj la angla. Tio ebligas aktivan partoprenon de neesperantistaj fakuloj, kiuj povas sperti la valoron de Esperanto. Krome tio substrekindas, ke ĝi ne estas kontraŭ landaj, regionaj lingvoj, nek kontraŭ la nuna internacia lingvo kiu, vole nevole, estas la angla. Tiaj konferencoj okazu kadre de ĉiuj internaciaj E-kongresoj.

Tamen mi atentigu, ke endas substreki la lernhelpan efikon de Esperanto por faciligi la eklernadon de fremdaj lingvoj, ekzemple per la projekto „*Multlingva akcelilo*” kadre de la eŭropa programo *Erasmus+*. Fakte, dum tiuj kvin jaroj de tiuj artikoloj pri Esperanto en la AEDE-informbulteno, mi neniam skribis pri la kreinto, nek pri la historio de la lingvo. Nur en la unua dosiero de 2015 estis prezentado de Zamenhof, kiun verkis la ĉefredaktistino laŭ teksto de unu „Kroniko de Esperanto”, kiun mi oficiale prizorgis monate en la franclingva belga tagĵurnalo *La Dernière Heure*, (Bruselo, eldonkvanto 125 000) ekde januaro 1980 ĝis decembro 1987 laŭ peto de la ĉefredaktisto.

ILEI-membroj, ĉefe eŭropaj, kiuj dezirus ricevi pli da informoj pri tia kunagado, aŭ kiuj pretus aktive kunlabori, turnu sin al Germain Pirlot gepir.apro@pandora.be

Esperanto kaj sociaj sciencoj

de Javier ALCALDE (Hispanio)

Kiam oni pripensas la instruadon de Esperanto en formala etoso (ekz. publika lernejo aŭ universitato), oni kutime imagas kurson de la lingvo, foje en la kadro de interlingvistiko. Mia opinio limigas la vastan eblaron, kiun instruistoj el ĉiu fako havas je sia dispo. En tiu ĉi teksto mi prezentos plurajn spertojn el sociaj sciencoj, sed la listo de similaj ideoj estas senfina.

Unu el la kursoj, kiujn mi instruas, nomiĝas *Ekonomio de Eŭropa Unio*, sed reale temas pri enkonduko al EU. Komprenoble, krom instrui la ĉefajn punktojn de la temaro, mi rajtas emfazi kelkajn aspektojn aŭ elekti aliajn pritraktindajn temojn. En tiu kadro mi parolas plurfoje pri Esperanto. Unue mi parolas pri ĝi en enkonduka historia sesio, kiu klarigas la militan pasintecon kiel gravan faktoron por la estiĝo de Eŭropa Unio. Mi povintus uzi iun ajn bildon pri tiu epoko, sed mi konscie montras kelkajn esperantajn afiŝojn (ekz. pri la hispana milito aŭ pri laborista olimpiado). Ofte du aŭ tri lernantoj rekonas la lingvon kaj klarigas al la aliaj pri kio temas. Tiam mi simple diras, ke kiel videblas en la bildoj, en tiu epoko tiu lingvo havis publikan rolon pli evidentan ol hodiaŭ. Due, mi dediĉas sesion al la lingva politiko: al ĝiaj alternativoj. La lernantoj surpriziĝas, kiam ili ekscias, ke en la Eŭropa Parlamento oni rajtas uzi pli ol 20 malsamajn lingvojn. Tiel debato prie okazas nature kaj ne malofte estas iu, kiu memoras pri Esperanto kaj danke al tio oni povas tion pridiskuti. Foje mi tiam parolas pri la fakaj debatoj pri lingva justeco. La celo de tio estas komprenigi, ke ekzistas lingva problemo en EU, kiu rilatas kaj al justeco kaj al efikeco.

Alia sesio de la kurso prezentas la tutan politikan procezon de kreado de nova leĝo en Eŭropa Unio, ekde kiam nova afero aperas en la tagordo, ĝis oni pretigas malnetan leĝon, aprobas ĝin, efektivigas ĝin, pritaksas ĝiajn rezultojn ktp. Por komprenigi tion, helpas uzi ekzemplon. Kaj ĉar ili jam konatiĝis kun la defioj de lingva politiko en EU, mi petas ke ili uzu la enkondukon de Esperanto kiel oficiala lingvo, por pripensi kiujn problemojn tia politiko devus alfronti, kiel oni superus ilin, kiel oni taksus ties rezultojn ktp. Kvare, oni devas lerni, ke la eŭropaj civitanoj rajtas diskutigi en la eŭropa parlamento ion ajn, kondiĉe ke unu miliono apogu tiun konkretan proponon. Denove ekzemplo helpas komprenigi la ideon. Ĉi-foje mi uzas la sugeston prezentitan de Eŭropa Esperanto-Unio, por ke la eŭropa himno estu kantata en la internacia lingvo. Jen oportuno por aŭskulti ĝin kaj sperti kiel ĝi sonas, eĉ kun klarigo pri ĝiaj gramatiko kaj vortkonstruado. En la

ekzameno, mi inkluzivigas multajn demandojn, inter ili unu specife pri Esperanto, ekz. „Klarigu kiujn kulturajn/ politikajn/ekonomiajn sekvojn havus la enkonduko de Esperanto kiel oficiala lingvo en EU”. Kaj ankaŭ alian, en kiu mi petas ilian opinion pri la nunaj defioj de EU por agadi en internaciaj rilatoj. Kutime pluraj mencias la lingvan aferon en siaj respondoj. Fine, en tiu kurso oni devas verki esploran eseeton pri libera temo. Kaj jes, ankaŭ ĉi tie, se ni pritraktis ĝin antaŭe, iu elektas Esperanton. Aliajn fojojn, kiam kelkaj ne havas ideon pri temoj por la eseo, ili demandas min kaj mi donas al ili plurajn eblojn... inter ili la lingvon de Zamenhof.



Ĉu tiel kreiĝas movadanoj? Verŝajne ne. Ĉu iu eklernos la lingvon post la kurso? Malfacile. Sed almenaŭ ili konatiĝis kun la fenomeno Esperanto: ili pripensis ĝian potencialon, ili scias, ke temas pri vivanta lingvo kaj ke ĝi estas facile lernebla, interalie per la reto. Alivorte, mi semis. Kaj se en la estonteco ili renkontos la lingvon denove, eble ili decidus alproksimiĝi al ĝi pli profunde.

El simila perspektivo mi parolas pri Esperanto en aliaj kursoj, kiujn mi instruas. En *Geopolitiko kaj Internaciaj Rilatoj* mi ofte emfazas la lingvan

aferon (kiel kaŭzo kaj kiel sekvo), kiam mi parolas pri militoj aŭ perfortoj. Ekzemple, pri la estiĝo de Bangladeŝo. Tiel ili komprenas la gravecon de la lingva dimensio en pasintaj kaj nunaj konfliktoj. Krome, mi dediĉas tutan sesion al la geopolitiko de lingvoj. Tiam mi klarigas, kial la pliparto de la mondo parolas lingvojn, kiuj devenas el Eŭropo. Komence surprizis min vidi, ke multaj el la lernantoj neniam antaŭe pensis pri tio. Due, mi parolas pri la intima rilato inter lingva povo kaj ekonomia/politika povo kaj kiel eĉ hodiaŭ ĉiuj landoj klopodas disvastigi sian lingvon, interalie kiel elementon de mola povo (soft power). Trie, por klarigi ĝis kia grado la povuloj timas ŝanĝojn en la lingva reĝimo, mi iom detale prezentas la persekutojn, kiujn suferis esperantistoj. Tiurilate mi ankaŭ pritraktas la debatojn pri lingva politiko en la Ligo de Nacioj. Krome, en tiu sesio mi mencias soci-lingvistikajn teoriojn pri lingva imperiismo kaj konceptojn kiel lingvaj homaj rajtoj kaj lingva genocido. En la praktika parto de la leciono la lernantoj devas partopreni debaton pri la estonteco de la internacia lingva reĝimo. Kelkaj devas defendi la nunan dominadon de la angla. Aliaj devas emfazi la potencialon de traduka teknologio por certigi la lingvan diversecon el daŭripova perspektivo. Kaj aliaj devas apogi la enkondukon de Esperanto kaj por efikeco kaj por justeco. En tiu debato klare videblas ĉiuj argumentoj, kaj multaj studentoj pripensas verŝajne la unuan fojon pri la privilegioj de la denaskaj anglo-parolantoj. Je la fino de la leciono mi demandas al ĉiuj kiu estas l/ŝia preferata opcio. Jen la rezulto: ĉiam estas iu (foje multaj), kiu elektas Esperanton. Tiam ni diskutas pri tio kiel atingi tion, ĉu ĝi dezirindas, ĉu ĝi eblas ktp. Denove en tiu kurso estas ekzameno, en kiu mi kutime inkluzivigas demandon pri la zamenhofa lingvo, ĝia potencialo kaj la kialoj de la persekutoj. Rilate al la esplora eseeto, ofte estas iu, kiu elektas fokusiĝi pri la lingva dimensio de iu konflikto aŭ eĉ pri la historio kaj defioj de Esperanto.

La tria kurso, kiun mi instruas, estas *Teorio de Demokratio*. Temas pri perreta kurso por magistriĝo pri politika analizo. La kurso enhavas kvar partojn, du teoriajn kaj du empiriajn. La dua parto emfazas la ideon de egaleco kiel ĉefa elemento de demokratio. En tiu kadro mi prezentas kiel unu el la lernendaj temoj la fakan debaton pri lingva justeco el politika filozofio. Tial oni lernas, ke kelkaj aŭtoroj opinias, ke politiko devas esti farata en la denaska lingvo; nur tiel estos egaleco, demokratio kaj justeco. Kontraŭe, aliaj aŭtoroj opinias, ke pli gravas havi/uzi komunan lingvon tiel, ke oni povu celi soci-ekonomian egalecon; nur tiumaniere, ili daŭrigas, kreiĝos lingva justeco. Denove nature enŝoviĝas la ideo de neŭtrala helpa lingvo, kiu kapablas trovi mezan vojon, ebligante kaj la apogon al lingva diverseco kaj

la lukton kontraŭ lingva diskriminacio, kaj efikecon kaj justecon. En tiaj perretaj kursoj oni devas fari praktikan ekzercon pri ĉiu parto de la kurso. Koncerne tiun duan parton, mi inkluzivigas demandon, kiu pritraktas la lingvan aferon, ekz. en Eŭropa Unio. Eblo estas legigi artikolon en ĵurnalo, kie la aŭtoro pledas por la angla kiel nura oficiala lingvo de EU. Mi petas, ke la studentoj pripensu la sekvojn de tiu politiko el vidpunkto de egaleco. Mi ankaŭ petas, ke ili imagu alternativon. Iumaniere ripetiĝas la debato okazanta en *Geopolitiko* kaj aperas similaj argumentoj. Tamen ĉi-foje ili ne konfrontiĝas unu kun la alia kaj mi mem devas tion fari en miaj detalaj korektoj kaj personaj respondoj. Aliajn fojojn mi uzas la blogon de la kurso, por ke tiu debato okazu publike. Tiel ĉiu el ili devas verki resumon de siaj pripensoj kiel blogeron, sed ankaŭ komenti la blogeron de alia samkursano. Fine, en la ekzameno mi petas, ke ili klarigu kion signifas lingva justeco kaj kiel tio rilatas al la teorio de demokratio.

Jen miaj tri spertoj pri Esperanto kaj sociaj sciencoj. Mi konscias, ke estas multe pli da ebloj kaj verŝajne estontece mi provos aliajn. Espereble tiu mallonga rakonto inspiras aliajn instruistojn kaj profesorojn kuraĝi paroli pri la internacia lingvo en siaj fakaj kursoj, kaj kiel ekzemplo de unu el la pritraktataj temoj, kaj kiel esplorobjekto.

Programo „Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano en la tuta mondo”

Louis Lu Wunsch Rolshoven anoncas:

Saluton!

Antaŭ kelkaj jaroj mi komencis popularigi la ideon, ke antaŭ instruado de Esperanto en lernejoj plej bone oni unue informu multajn lerneĵanojn pri Esperanto kaj ĝia hodiaŭa uzado – dum unu aŭ du lecionoj. Tiucele mi lanĉis la agadon „Unu leciono pri Esperanto” por lerneĵanoj. Kompreneble mi longavide ŝatus, ke ĉiu lerneĵano en la mondo havu tian lecionon – sed mi ja tre konscias, ke tia celo daŭros ankoraŭ iom...:)

Klaus Friese el Hamburgo, pensiiĝinta instruisto, verkis etan broŝuron pri la temo, en kiu mi kunlaboris. Intertempe la broŝuro ekzistas en ses lingvoj (Esperanto, franca, angla, itala, germana, turka). Elŝuteblas sur

<http://esperanto-klaus.de/> (serĉu „leciono”). Pliaj tradukoj kompreneble treege bonvenas ☺.

Mireille Grosjean tre afable subtenas la agadon ĉe ILEI kaj metis multan materialon sur la ILEI-paĝon <https://www.ilei.info/agado/projektoj.php>. Ŝi ankaŭ verkis pri la agado en la Ondo de Esperanto (<http://sezonoj.ru/2017/05/ilei-13/>).

Brila kampanjo por „Unu leciono” en Rusio

En septembro kaj oktobro rusaj aktivuloj sub gvido de Irina Gonĉarova realigis brilan kampanjon por „Unu leciono pri Esperanto” kun grandioza sukceso: 12 homoj instruis, ili prezentis sume 27 lecionojn pri Esperanto en 15 klerigejoj. Ĉeestis entute 666 lernejoj de la 5-a ĝis la 11-a klaso kaj aldone studentoj aĝaj ĝis 21 jarojn. Admirindege! Jen ekzemplodona agado, kiu bonege funkciis! ☺ Grandan gratulon al la gvidantino de la projekto „Unu leciono pri Esperanto por lernantoj” en Rusio, Irina Gonĉarova, kaj al ĉiuj kunagantoj: Aleksandr Blinov, la 17-jara Dmitrij Timin, la 16-jara Matvej Blinov, Ivan Sarkisov, Artemij Cirkovskij, Viktor Lagutin, la 15-jara Roman Ralko, Dmitrij Ĵuravljov, Jelena Kuznecova, Eŭgeno Bojĉin, Ikar Akimenko.

Artikolo aperis pri la sukcesa kampanjo en Rusio en: La Ondo de Esperanto, 2019, N-ro 11, p. 27-28.

Mi tre ĝojas pri tiu bela paŝo antaŭen. ☺ Eble en iuj aliaj landoj troviĝos ankaŭ aktivuloj, kiuj ŝatos survojjigi similan kampanjon, ĉu?

Lu WUNSCH-ROLSHOVEN

EsperantoLand, prezidanto

Germana Esperanto-Asocio, respondeculo pri gazetaro kaj publikaj rilatoj

Irina Gonĉarova anoncas:


Ĉiu junulo en la mondo rajtas scii pri la ekzisto de Esperanto!

Tutrusia projekto „Unu leciono pri Esperanto por lernantoj”- 2019

Antaŭ kelkaj jaroj ILEI alvokis la tutmondan esperantistaron inviti lerneajn instruistojn okazigi unu-du lecionojn de/pri Esperanto por lernantoj. La projekto, iniciatita de Lu Wunsch-Rolshoven, metodike prilaborita de Klaus Friese kaj ekipita per organizaj materialoj de Mireille Grosjean, nomiĝas

„*Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lerneĵano en la tuta mondo*”
(<http://www.ilei.info/agado/projektoj.php>).

Trafa kaj aktuala ekŝajnis al ni la ideo informi la junularon pri la ekzisto de Esperanto: en Rusio plej multaj homoj simple neniam aŭdis pri la lingvo. Klere kaj entuziasmige informitaj, oni povos poste (aŭ eĉ tuj) fari sian elekton – ĉu lerni Esperanton aŭ ne. Tiel en Rusio aperis informa projekto, celanta gejunulojn. Ni penis adapti niajn agojn al realo: ni ne havas rimedojn kaj eblojn informi pri Esperanto ĉiun lerneĵanon. Aliflanke ni vastigis la aĝlimon de la informotoj ĝis 21 jaroj, konsiderante ankaŭ studentojn. Ni limigis la tempon de la projekto por du monatoj, en la komenco de la rusia studjaro, por ke instruemuloj ne opiniu, ke ili povas realigi lecionojn iam ajn – kaj pro tio realigi neniam. Konforme al tiuj ŝanĝoj la rusa versio de la ILEI-projekto ricevis la nomon „*Unu leciono pri Esperanto por lernantoj, septembro- oktobro 2019*”. La agado startis la 1-an de septembro kaj finiĝis la 31-an de oktobro 2019.



La fazo-2019 estis eksperimenta. Ĝi devis havigi al ni sperton pri sukcesaj kaj malsukcesaj agadmanieroj kaj montri, ĉu indas evoluigi tiun ĉi provon. Kaze de sukceso, ĝi preparus la grundon por pliaj paŝoj.

Estis farita granda laboro por klarigi la celojn kaj gravecon de la projekto al esperantistoj kaj neesperantistoj, al spertuloj kaj novuloj, al aĝuloj kaj gejunuloj. Estis bezonataj konstantaj konsultoj, kreo de interretresurso kun materialoj, uzeblaj por la prelegoj, inspirado de hezitantuloj, akirado de regula raportado, skrupula analizado de lokaj situacioj kaj resumado de la rezultoj. Nun ni povas prezenti tiujn.

Jen la ĝenerala statistiko: 12 instruantoj faris 27 lecionojn de Esperanto (el kiuj – 11 po 15 minutoj, aliaj – po 40-45 minutoj) en 15 klerigejoj de 9 urboj sume por 666 lernantoj de la 5-11-aj klasoj kaj studentoj aĝaj ĝis 21 jarojn. Detalajn raportojn pri ĉiu leciono, kun ciferoj kaj fotoj, ruslingvanoj povas trovi en la grupo „Informu!” (<https://vk.com/informado>) en la socia reto „VKontakte”, startigita la 1-an de septembro por helpi „Unu lecionon...”.

Diverse reprezentiĝis ses el ok rusiaj federaciaj regionoj (ne partoprenis Nord-Kaukazio kaj Uralo): de unu leciono en Nord-Okcidento, Siberio kaj Fororiento tra du en Sudo kaj kvar en Centro al 18 en Volgio (pli detale: en la urbo Ĉeboksaro okazis 17 prezentoj por 408 lernejanuloj kaj studentoj, en la urbo Samaro – unu kun 28 lernejanuloj).



Grava kaj ĝojiga trajto de la tuta agado estis la partopreno de junuloj. Inter 12 instruantoj estis tri junuloj el Moskvo, Sankt-Peterburgo kaj Ĥabarovsko, kiuj aĝis 24, 25 kaj 26 jarojn kaj tri lernejanuloj – el Moskvo kaj Ĉeboksaro, kiuj aĝis 15 kaj 16 jarojn.

Kvankam prezenti Esperanton povus ajna klera homo, amanta la lingvon, ĉi-foje ni iris la plej facilan vojon, allogante por instruado nur esperantistojn. Multaj el ili havis pozitivan sperton rakonti pri Esperanto (aŭ aliaj lingvoj) dum la landaj lingvaj festivaloj. Ĉies elpaŝo inkluzivis skizon de la tuta Esperanta gramatiko kaj rakontojn pri la Esperantaj movado kaj kulturo. Ĉiu instruanto nepre informis pri ebloj lerni Esperanton memstare kaj senpage en interreto.

Alia grava konkludo el la eksperimento estas, ke por penetri lernejojn kaj universitatojn oni bezonas nenion krom personajn konatojn, kiuj povus rekomendi la lecionon al la administrantaro aŭ mem surpreni pri ĝi respondecon. Multe faciligas la aferon, se la preleganto pri Esperanto mem estas lernanto aŭ instruisto, studento aŭ profesoro de la klerigejo. En tiu senco ILEI havas riĉan rezervon de eventualaj prezentantoj de Esperanto – ja plej multaj ILEI-membroj estas profesie ligitaj kun lernejoj aŭ universitatoj.

Niaj rezultoj montris la vivkapablon de la projekto en la kondiĉoj de Rusio. Videblas vojoj progresigi la aferon, multobligante la aron de la instruantoj. Sed por varbi novajn popularigantojn de Esperanto kaj ne perdi la nunajn necesas multe labori tra la tuta jaro. Volonte respondos ĉiujn demandojn de interesiĝintoj la verkinto de tiu ĉi teksto.

Multajn sukcesojn al ĉiuj surkampe de Esperanto-popularigo!

Irina GONĈAROVA
respondeculo de REU pri ekstera informado
gvidanto de la projekto „Unu leciono pri Esperanto por lernantoj”
administranto de la VK-grupo „Informu!”
[*mirinda.strigo@gmail.com*](mailto:mirinda.strigo@gmail.com)

Klaus Friese anoncas:

1. Traduku niajn broŝurojn por havi materialon en via loka lingvo.
 2. Serĉu multajn aktivulojn, kiuj portas la broŝurojn al la lernejoj.
- Bonan sukceson!

Mireille Grosjean konkludas:

Kompreneble la rilatoj kun la lernejoj kaj la edukministroj estas malsamaj en diversaj landoj. La strategio de Lu kaj ILEI konsistas el kontakto sen interveno de iu esperantisto. Ŝajnas, ke tio ne konvenas en Rusio. Pro tio Irina Gonĉarova lanĉis alian strategion kaj sugestas vizitojn de esperantistoj

en la lernejoj. Ilia entuziasmo kreu, veku lernemulojn. Laŭ tio vi, kara leganto, pripensu, kiu strategio konvenas al via lando, al viaj kutimoj.

Laŭ miaj scio kaj observoj en Svislando kaj supozeble en okcidenta Eŭropo ni preferas aŭdi faktojn ol aŭskulti ardaĵn entuziasmulojn. Faktoj efikas, entuziasmo tedas. Mi legis ie: Entuziasmo estas la armilo de malfortulo. Racie prezenti faktojn efikas pli ol rakonti vigle kaj ripeteme siajn kontaktojn kaj vojaĝojn. Memoru la konsilojn kaj atentigojn de Germain Pirlot, kiu luktas en Belgio por nia ideo. Denove ni devas konfesi, ke tia analizo povas esti malsama laŭ la landoj kaj kulturoj. Do denove, kara leganto, vi elektu taŭgan strategion gardante en via kapo la bazan principon: mi adaptiĝu al mia celpubliko.

Kvartaga kurso Instruista Trejnado (EIT) en Buĵumburo post la 7-a Afrika Kongreso de UEA

Ekde la 28-a ĝis 31-a de decembro 2019 mi ĉeestis kurson, kiun gvidis Mireille Grosjean en Buĵumburo post la 7-a Afrika Kongreso de UEA.

Estis laboriga kaj intensa programo, sed interesa etoso, dum kiu Mireille Grosjean helpis al ni malkovri diversajn uzmanierojn kaj strukturojn de la lingvo. La programo celis akirigi al ni konkretajn sciojn de la pedagogio. Mireille Grosjean povis respondi al niaj demandoj klarigindaj. Kun ŝi ni traktis kelkajn proponindajn ekzercojn, la manierojn prezenti ekzercojn ktp.

Mireille Grosjean ĉeestis nian instruadon de lecionoj dum la 7-a Afrika Kongreso kaj taksis nian nivelon. Dum la kvartaga programo postkongresa,

ŝi sugestis al ni pozitivan evoluigon pri nia strukturado de kurso. Ŝi ankaŭ sugestis al ni referencojn de kelkaj eŭropaj pedagogoj, kies scioj ne atingis nin en Afriko kaj povos inspiri nin.

Mirejo! Estis granda ĝojo por ni esti kun vi dum via restado en Burundo. Ni multon lernis de vi. Viaj konsiloj, viaj klarigoj ege valoras.



Gilbert NDIHOKUBWAYO, partoprenanto de EIT

Post la 7-a AKE, kiu okazis en Burundo, mi sukcesis sekvi kun Mirejo Grosjean la finon de la kurso en RITE. Mi havis kvar tagojn kun ŝi. Ŝi estas la plej bona instruisto, kiun mi iam ajn vidis. Mi antaŭe havis problemon en la parola parto. Estis malfacile por mi distingi „ke” kaj „kiu” en miaj frazoj, sed post kvar tagoj kun Mirejo, mi evoluis kaj mi finfine sukcesis uzi tiujn vortojn en miaj frazoj. Ŝi estas sperta.

La objekto de la kurso estis kontroli kaj gvidi nin strategie kaj taktike pri moderna instruado, ĉar la maniero, kiun ni uzis dum la instruado, estis arkaika. Mi spertis la novan metodon pri instruado kiel la induktan metodon, kiu estas bona dum la instruado. La programero en RITE est/as/is mojosa, mi dankegas al ĉiuj, kiuj pensis pri ĝi. Mi dankas al Katalin, kiu sekvis min de la komenco ĝis la fino en RITE. Mirejo! Mi multe lernis de vi, vi bone progresigis mian parolkapablon. Mi ne povas forgesi viajn restadojn en Burundo. Vi ĉiam konsilis kaj korektis min, kiam mi eraris.

Patrick MANIRAKIZA, partoprenanto de EIT

Antaŭ ol partopreni en la trejnado ĉe La Perle Hotel en Bujumburo, mi faris multajn erarojn, sciante aŭ ne sciante. Sed dum la tagoj, kiujn ni pasigis kune, mi lernis multon. Dank' al la instruistoj, taktikoj tra ekzercoj kaj rakontetoj de Mirejo, ŝi faciligis la komprenon, la kursgvidon; eĉ la longa daŭro de la kurso ne lacigis nin. La tekstaj tradukadoj kaj la frazstrukturoj estis plej amuzaj kaj pli scivolemigis nin. Tiel ni faris multajn interesajn demandojn. Mirejo! Mi glate sekvis kaj dezirus sekvi denove viajn gramatikaĵojn kaj kursgvidtalentojn viajn. Mi dankegas vin pro via disponeblo, viaj tempo kaj energio.

Koffitche KOUFIONOU el Togolando, ĉeestanto de la kurso EIT

Piaget ne atingis Afrikon

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Jean Piaget, sed ankaŭ Montaigne, Erasme, Pestalozzi, Comenius, Montessori, Bruno Bettelheim, Alexander Neill (gvidanto de la lernejo Summerhill), Célestin Freinet, Rudolf Steiner, jen kelkaj el la eŭropaj psikologoj kaj pedagogoj, kiuj evoluigis la instruadon en la tielnomata malnova kontinento. Afrikanoj ne povis, ne rajtis koni la instruon de tiuj pedagogoj. Ili vivis en kolonioj, kie kelkaj el ili, bonŝancaj, rajtis lerni skribi kaj legi, kie iliaj lingvoj estis negative konsiderataj, kie la alfabetoj por skribi

tiujn lokajn lingvojn estis malpermesitaj. La koloniantoj tute ne volis, ke la popoloj fariĝu inteligentaj kaj agemaj. Kiam venis la sendependiĝoj en la sesdekaj jaroj, la lernolibroj restis la samaj dum multaj jaroj. Cheick Modibo Diarra rakontas tion en sia libro „Navigateur interplanétaire”: la lernolibroj restis la samaj. En Malio li kiel ĉiuj infanoj devis parkerigi „Nos ancêtres les Gaulois” (niaj prauloj la Gaŭloj) same kiel ĉiuj infanoj en Senegal, Maŭritanio, Ĉado, Benino, Ebur-Bordo kaj aliaj landoj....

Nuntempe la afrikaj klasoj kutimas enhavi 70 ĝis 200 lernantojn. Eĉ starigi demandon estas malfacila afero. La lernanto devas ekstari por respondi. Debato ne okazas. La instruisto skribas sur la tabulo, la lernantoj kopias en sia kajero. Iom tiel aspektis la provlecionoj de la du kandidatoj de Esperanto Instruista Trejnado (EIT) dum la sepa Afrika Kongreso en Buĵumburo. Mi devis klarigi al ili la cirkonstancojn, kiujn vi ĵus legis, kara leganto. Ili ne kulpas. Aliaj eŭropaj samideanoj faris la saman konstaton en aliaj afrikaj landoj. La edukado, kiun iu persono ricevis, ĉiam influas, kiun tiu persono kapablas doni.

Tre interesan strategion lanĉis la tanzania ŝtatestro Julius Kambage Nyerere, prezidento de 1964 ĝis 1985. Li organizis la studobjektojn en la lernejoj inkluzivigante agrikulturon. La infanoj lernis novajn kultivmetodojn kaj bredmetodojn kaj alportis ilin al sia hejmo al sia familio. Eŭropanoj povus lerni de tio....

Fakto estas, ke Burundanoj kaj Beninanoj kaj supozeble aliaj Afrikanoj konstruas Esperanton sur siaj konoj de la franca. Mirejo demandis: en la esprimo „il pleut” kiom da vortoj. „Du”. Kiom da ideoj? Same du: pluv- kaj ideo en asa, aseca, nuntempa. Do en Esperanto: „Pluv-as”; unu duparta vorto sufiĉas. „il” estas deviga en la franca, tamen sen ia signifo, do superflua en Esperanto, ne tradukenda. En la formulo „La eta princo”, titolo de fama verko, la sufikso -et- emancipiĝis kaj fariĝis adjektivo, post ricevo de la



finaĵo -a. Zamenhof ne antaŭvidis tion, sed tiu evoluo lezas neniun regulon. Burundanoj miras aŭskultante tion, ili tute ne kutimas al tio, neniun montris al ili nian lingvon laŭ tiu maniero. Tamen ili devus, por adekvate instrui nian lingvon kaj ĝiajn ecojn, kiuj estas sufiĉe malsimilaj al tiuj de iu etna lingvo kiel la franca, la angla, la hispana, la ĉina.

Mi estas en dilemo. Se mi estas en Afriko, ĉu mi instruu kiel Afrikanoj instruas? Aŭ ĉu mi instruu laŭ mia eŭropeca maniero, kiu ĝenas ilin, kiu skuas ilin, kiu prezentas al ili nefareblajn paŝojn.... Mi vidas min sur monto, ilin sur alia monto kaj inter ni vidiĝas profunda valo.... Mi etendas mian manon, ili same... ĉu ni sukcesos tuŝi niajn manojn... konstrui ponton... En Benino same kiel en Burundo mi provis kaj provadas trovi mezan vojon: ke mi faru iom de la vojo kaj ke mi klarigu sufiĉe, por ke ili povu iom veni al mi. Tikla momento, granda defio.

Nun la du kandidatoj de EIT ĉi tie en Buĵumburo devos fari du pliajn lecionojn, kiujn mi vidos per filmo aŭ skajpo. Tiuj lecionoj devos havi enkondukan tekston legendan, demandmomenton mallongan, momenton limigitan por klarigoj kaj tri ekzercojn. Ni estis kune dum kvar tagoj post la Kongreso por studi pri metodiko; du aliaj kongresanoj ĉeestis. La diskutoj montras jam gigantan evoluon. Ni vidos. Supozeble ĉio iros glate kaj ILEI havos du diplomitajn instruistojn en Afriko. ILEI havas unu diplomitinon en Francio kaj du Hispanojn en preparo. Do sume kvin laŭ la nova RITE-sistemo. Granda danko iru al Katalin Kovats, kiu sekvis iliajn progresojn kaj penojn tra la tuta jaro kaj eĉ pli.

Laŭ mi ni devas repensi EIT-n por trovi vojon eblan en la tuta mondo, ĉar ILEI laboras mondscale. Mi tuŝas la temon en mia enkonduko de tiu ĉi numero.

Raporto de ILEI-delegitoj pri la Ĝenerala Konf. UNESKO 2019

La 40-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO okazis de la 12-a ĝis la 27-a de novembro en Parizo.

Ekde la unua tago, ni dispartigis inter ni la flugfoliojn tradukitajn al 18 lingvoj kaj Martine Demouy disdonis al ni la liston de antaŭviditaj parolantoj; sin anoncis pli ol 178 el 193 partoprenantoj.

La nova teamo provis malkovri ne nur la homojn sed ankaŭ la lokojn por la nova tasko. ILEI havis 5 delegitojn, kiuj konsciis en kiu maniero, kun kiuj homoj ili pretas rilati; kaj certe, ĉiu el ni varbis en koridoroj, vicoj, restoracio kaj kokteloj. Oficiale ni kontaktis 60 ŝtatojn en la granda salono. Bedaŭrinde, kelkaj delegacioj alvenis ĉiam lastminute kaj estis malfacile renkonti ilin.

Tiun ĉi jaron pli ol 200 ŝtat- kaj NRO-representantoj petis parolvicon, kaj inter la lastaj UEA. François Lo Jacomo brile alparolis la homojn:

<https://www.facebook.com/ngounesco/videos/434908283861489/?t=10>

Same kiel en 2017, la ĉefaj temoj rilatis al la celoj (2015-2030): daŭripova evoluigo, klimataj ŝanĝiĝoj kaj iliaj konsekvencoj. Multaj parolantoj plendis pri translokiĝo de homoj, lernejoj detruitaj... kaj pledis por altkvalita edukado por ĉiuj kun bone trejnitaj instruistoj, protektado kaj promociado de kultura diverseco, protektado de la indiĝenaj lingvoj kaj de mondaj heredaĵoj, rajto sin esprimi, protektado de ĵurnalistoj. Multaj delegacioj parolis pri multflankeco.



Same kiel en 2017, kiam eblis, ni provis prezenti al homoj dokumenton en ilia gepatra lingvo. La angla lingvo estis uzita 95-foje, la franca 30-foje;

la reprezentantoj de kelkaj delegacioj uzis ambaŭ lingvojn. Daŭre pri lingvoj, ni aŭdis 15 fojojn la araban, 16 fojojn la hispanan, 3 fojojn la rusan kaj 1 fojon la ĉinan. Pli kaj pli da ŝtatoj ŝatas uzi sian nacian lingvon, tiel ni aŭdis 4-foje la portugalajn, po 1 kelkajn aliajn lingvojn, la hindian, la serbo-kroatan, la turkan, la korean kaj kanzonon en la maori lingvo. En Myanmar, 54 lingvoj estas instruataj.

La 18-an de novembro 2019, okazis la transdono de la „Atlaso pri la indiĝenaj popoloj en Kanado” al la biblioteko de UNESCO. La honora invitito estis Wilton Littlechild, granda ĉefo, kiu reprezentas la Asembleon de la Unuaj Nacioj en Kanado. *(vidu la suban foton pri tiu evento!)*



La 20-an de novembro, pli ol 400 gelernantoj invadis la salonon por festi la 30-jariĝon de la Rajtoj de la Infanoj. La franca Prezidento Emmanuel Macron ĉefe invitis ilin lukti kontraŭ ĉikanado kaj seksa turmentado. Kuraĝe, du adoleskantoj atestis pri siaj suferoj. Poste, infana koruso bele kantis kanzonon, kiu rilatas al la problemoj de migrantoj, kaj venis fama franca

slamisto¹: „Grand corps malade”. En sia kanzono, li uzis rekantaĵojn por amdanki al siaj gepatroj.

La kvin ILEI-reprezentantoj estis Martine kaj Max Demouy, Jesper Jakobsen, kiu povis ĉeesti nur unu tagon, Josiane Moirand kaj Monique Arnaud. Tre agema teamo, bonega etoso.

Raportis Monique ARNAUD, fotis Martine DEMOUY

Ĉefaj decidoj de la 40-a Ĝenerala Konferenco

En la literaro UNESKO, „E” signifas Edukado kaj multaj tagorderoj rilatis al edukado tra la mondo:

- alfabetigo de junuloj kaj plenkreskuloj: reviziita teksto ĉar malgraŭ la streboj de la landoj, en multaj mondopartoj restas analfabetoj
- edukado por daŭripova disvolviĝo kaj protekto de nia planedo
- internacia klasifikado de la trejnprogramoj por instruistoj
- atentigo pri novaj edukelementoj per kreo de Mondaj tagoj (pri matematiko, inĝenierado por daŭra disvolviĝo, arto, logiko); mondaj semajnoj (pri enkonduko al amaskomunikiloj kaj informado; pri edukado al artoj), jaro pri fundamentaj sciencoj kaj disvolviĝo.
- antaŭpreparo de dokumento pri etiko en artefarita inteligenteco.
- laŭ propono de Francio, monda tago kontraŭ perforto kaj turmentado en lernejoj. Se antaŭe lernejoj facile primokis dikulon, rufharulon ks rekte dum la paŭzoj, nun pere de la reto, estas facile anonime turmentadi lernejanon, kiu ĝenerale preferas silenti, ne raporti al la geinstruistoj aŭ al la gepatroj por ne riski plian turmentadon. Ne venas al ili la ideo simple ne malŝalti la komputilon... La ideo estas atentigi la lernejanon, sed ankaŭ la edukistojn pri la dramo, post kelkaj sinmortigoj de infanoj, kiuj ne plu toleris tian trumentadon.

Renée TRIOLLE, triolle.renee@wanadoo.fr

¹ Slamo estas kantometodo simila al repo. Ĝi naskiĝis en Ĉikago en la 1980-aj jaroj kaj disvolviĝis en Francio ekde 1998, precipe per la intervenoj kaj prezentadoj de la poeto Piloto Le Hot (inter aliaj).

Monda Raporto pri Edukado

Dum la 40-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO, la 13-an de decembro 2019, la Instituto pri Statistikoj ĉe UNESKO raportis pri la donitaĵoj. Se ĉiuj akcentis la gravan rolon de edukado, la 4-a inter la Celoj por Daŭripova Disvolviĝo, konstatas, ke nur 5 el 10 lernantoj finas mezgradan lernejon. Enkondukiĝis nova metodologio por difini la kapablojn, ne forgesante laŭ la nuna slogano, virinojn kaj handikapulojn, sed multaj landoj ne komunikas donitaĵojn. Tamen nur la Ministrino pri Edukado el Grekio atentigis pri neatento pri la homaj valoroj de la lernejoj.

Mi faris la demandon: kiel statistiki kaj ciferumi la homajn kvalitojn (kapablo kun-labori, emo je interrilatoj, kritikemo) pri kio parolis la greka ministrino, kiuj supozeble pli utilos al estonta mondcivitano ol bonaj rezultoj en matematiko aŭ dominantaj lingvoj. Respondo estis, ke UNESKO funkcias laŭ interkonsento kaj ne eblas interkonsenti pri tiuj kvalitoj...

Kelkajn tagojn poste aperis la rezultoj de PISA (programo Internacia pri sekvo de akiritaĵoj ĉe lernejoj) kie brilas aziaj lernejoj (el Japanio, Koreio, Singapuro ktp) pri kiuj ni scias, ke post la oficialaj lernejaj horoj, ili plu studas en privataj kursoj do sukcesas en matematiko aŭ angla lingvo, sed ĉu ili same sukcesos en sia privata vivo?

Renée TRIOLLE, triolle.renee@wanadoo.fr

La 60-a Internacia Esperanto-Sumoo

De la 10-a ĝis la 24-a de novembro 2019

Nia retejo: <http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko: <https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

Analizo

1. Partoprenantoj: 308 el 35 landoj

Septembro 2018: 336 el 31 landoj

Novembro 2018: 331 el 33 landoj

Januaro 2019: 302 el 36 landoj

Marto 2019: 338 el 35 landoj
Majo 2019: 299 el 35 landoj
Septembro 2019: 300 el 32 landoj
Novembro 2019 308 el 35 landoj

2. Nombroj de partoprenintoj en ĉefaj landoj:

- 2019.11 (9 - 5 - 3 - 1 - 2018.11 - 9 - 7 - 5 - 3 - 1 - 2017/11 - 9 - 7 - 5 - 3 -)
1. Japanio: 67 (68 - 73 - 71 - 76 - 72 - 73 - 64 - 76 - 78 - 86 - 76 - 79 - 66 - 71)
 2. Brazilo: 44 (37 - 34 - 41 - 42 - 33 - 32 - 31 - 36 - 21 - 16 - 14 - 17 - 18 - 19 - 16)
 3. Francio: 30 (26 - 32 - 34 - 31 - 33 - 29 - 32 - 34 - 38 - 37 - 31 - 35 - 39 - 39)
 4. Rusio: 18 (15 - 15 - 14 - 13 - 14 - 11 - 11 - 16 - 17 - 18 - 13 - 10 - 13 - 15 - 17)
 5. Ĉinio: 17 (26 - 11 - 6 - 9 - 9 - 21 - 2 - 3 - 3 - 3 - 3 - 4 - 3 - 4 - 4 - 5 - 4 - 3 - 3)
Pollando: 17 (16 - 20 - 21 - 21 - 20 - 16 - 17 - 17 - 17 - 18 - 20 - 19 - 20 - 17 - 20)
 7. Vjetnamio: 14 (19 - 15 - 10 - 10 - 10 - 10 - 11 - 11 - 13 - 15 - 14 - 13 - 14 - 13 - 14)
 - Svisujo: 14 (14 - 13 - 1 - 14 - 2 - 13 - 1 - 13 - 1 - 13 - 13 - 0 - 0 - 11 - 11 - 11)
 9. Britujo: 9 (8 - 9 - 12 - 8 - 6 - 6 - 5 - 5 - 5 - 8 - 7 - 4 - 5 - 5 - 5 - 3 - 3 - 3 - 2 - 2)
Italio: 9 (8 - 8 - 9 - 10 - 9 - 8 - 9 - 9 - 9 - 9 - 7 - 8 - 8 - 6 - 6 - 6 - 4 - 5 - 5 - 6)
 11. Germanio: 8 (9 - 10 - 8 - 9 - 6 - 7 - 11 - 9 - 7 - 10 - 7 - 5 - 6 - 9 - 6 - 6 - 4 - 3 - 4)
Nepalo: 8 (6 - 7 - 7 - 7 - 6 - 7 - 7 - 7 - 7 - 14 - 8 - 6 - 6 - 6 - 9 - 16 - 5 - 5 - 7)
 13. Tajvano: 5 (4 - 4 - 11 - 4 - 4 - 4 - 4 - 4 - 4 - 5 - 5 - 9 - 4 - 14 - 3 - 2 - 3 - 2 - 1)
Nederlando: 5 (3 - 5 - 5 - 3 - 5 - 6 - 6 - 5 - 5 - 5 - 5 - 6 - 4 - 6 - 6 - 6 - 6 - 6 - 5 - 5)

3. Perfektaj venkintoj (15 venkoj): 268 el 308 (87%)

4. Kvanto de legitaj paĝoj: pli ol 20000 paĝoj

*Averaĝe unu homo legas 60 paĝojn dum 15 tagoj de la sumoo.

5. Komentoj:

1. Koreio tute ne leviĝis. Antaŭ la UK en Koreio la nombro superis 100. Kial tiel drasta falo okazis? Koreoj partoprenu!
2. Malaperis partoprenanto el Afriko. Tie estas diversaj problemoj por vivo.
3. El Oceanio unu partoprenis. Li estas fama verkisto, kies verkoj estas multe legataj en la sumoo.

HORI Jasuo, 371-0825 Japanio, Gunma, Maebasi, Ootone 2-13-3
<horizonto@water.sannet.ne.jp>

Gravaj kaj ne gravaj punktoj por la Ligo

de Mireille GROSJEAN (Svislando)

Esperanto + Edukado ILEI



Jen la titolo de nia kanalo ĉe **Youtube**. Mi tre ĝojas pri la helpo de Aristophio Alves Filho, nia sekciestro en Brazilo. Li kompetente kreas filmetojn, helpas al mi konverti prezentojn al filmetoj por tiu kanalo. Nun venas plia helpo: Aimé-Patrick Manirakiza el Burundo, tre lerta filmisto kaj muntisto, kiu ankaŭ helpas al mi kaj kontribuas. Iru rigardi la kanalon! Vi trovos kelkdekojn da filmetoj, pluraj povas bone kompletigi lecionon aŭ transdoni informojn kaj/aŭ lertigadon en pedagogio.

Zamenhof ne uzis retmesaĝojn

Zamenhof aprobis la formojn E-kurso, E-literaturo. Tion kelkaj esperantistoj metas sub mian nazon, kiam mi volas skribi la formojn Eo-kurso, Eo-literaturo. Inter la epoko de Zamenhof kaj la nuno aperis E-mail, E-banking, E-learning. Tie la litero E signifas elektronika... Tio modifas la situacion. Plie en 1964 ISO elektis oficiale la mallongigon eo por nia lingvo. Mi certas, ke konstatinte tion, Zamenhof favorus la formulojn Eo-kurso kaj Eo-literaturo, ĉar li ĉiam evitis koliziojn. Plie laŭ mia scio li nenie malpermesis skribi la formojn Eo-kurso kaj Eo-literaturo.

Festa ludvespero okaze de la 70-jariĝo de ILEI

(daŭrigo)

AKROSTIKO kaj aliaj kvizoj

AKROSTIKO 9.

Esperanto estas lingvo kun ĉar oni povas dedukti.....

Ne nepras, sed belegas.....

Sen vestaĵoj.....

Skandinava lando longforma.....

Unua litero de la individua kaj de la familia nomo de la nuna

Ĝenerala Direktorino de Unesko.....

Unua litero de la titolo de kolekto de gravaj literaturaj tekstoj.....

Unua litero de unu el la tri baltaj ŝtatoj.....

Tago plus = tagnokto (24 horoj).....

La afero estas..... = vi ne rajtas ne fari ĝin.....

(Li estis prezidanto de ILEI.)

--	--	--	--	--	--	--	--	--

DEMANDOJ PRI NIAJ HONORAJ MEMBROJ

1. Du gefratoj estas honoraj membroj de ILEI. Skribu ilian familian nomon.
2. Geedza paro, kie ambaŭ estas honoraj membroj de ILEI. Skribu ilian familian nomon.
3. En kiu lando estas plej multe da Honoraj Membroj? Kiom da HM estas en tiu lando?
4. Ĉu ILEI (aŭ ILEI kun alia instanco) havas alian manieron honori personon ol nomumi lin/ŝin honora membro? Se jes, kiel?

1. _____
2. _____
3. _____
4. _____

Kio komuna?

1. Ertl – Szerdahelyi – Keller – Nemere
2. Koutny – Molnar – Kovats – Korody
3. Gacond – Privat – Hodler – Grosjean.....
4. Hauptental – Kovacs – Ertl – Cassini
5. Stefan MacGill – Bradley Macdonald – Michael Leon
6. Colling – Miro – Alves Filho – Oliveira
7. Karine Arakeljan – Doi Ĉieko – Utho Mayer – Rob Moerbeek.....
8. Ostende – Pusan – Matanzas – Ranzan
9. Rob Moerbeek – Luiza Carol – Luigia Oberrauch-Madella.....
10. Dasgupta – Wells – Corsetti – Tonkin.....

PARIGU!! (*mallongigoj, sigloj*)

- | | |
|---------|--------------------|
| 1. TEJO | A. VERDULOJ |
| 2. ISAE | B. INSTRUISTOJ |
| 3. UMEA | C. KONSTRUISTOJ |
| 4. IFEF | Ĉ. FERVOJISTOJ |
| 5. ILEI | D. BLINDULOJ |
| 6. KELI | E. JUNULOJ |
| 7. SAT | F. SCIENCISTOJ |
| 8. LIBE | G. MEDICINISTOJ |
| 9. TAKE | Ĝ. KRISTANOJ |
| 10. AVE | H. SENNACIECEMULOJ |


El la landoj kaj sekcioj

Germanio

Mia tempo estas en viaj manoj. (Psalmo 31, 16)

Nora CARAGEA (* 10an de februaro 1930 Berlin, Germanio; + 13an de novembro 2018 Frankfurt/Main, Germanio)

Mia kara patrino estis fervora por Esperanto dum jardekoj en sia juneco kaj



dum jardekoj en sia maljuneco. Ŝi mankos al mi kaj al multaj konatoj en la Esperanto-movado tra la mondo. Interalie ŝi tradukis plurajn infanlibrojn de la Germana al Esperanto de Gudrun Pausewang (ekzemple „La infanoj en la arboj”). Ŝi estis longjara, aktiva membro de AGEI. Ŝi plu vivas en nia memoro ankaŭ per la pluraj libroj, kiujn ŝi tradukis al Esperanto.

Kiel sola infano ne havante kontaktojn en Esperantujo, mi tre

ŝatus informiĝi pri viaj spertoj, memoroj kun ŝi dum viaj renkontoj aŭ kunlaboroj. Skribu al caragea@mailbox.org

La funebra festo jam okazis en decembro en Frankfurto. La entombigo de la urno okazis en la arbara parto por entombigoj en Wilgartswiesen www.ruheforstwilgartswiesen.de januaron 2019.

Florina CARAGEA, Germanio

Esperanto-kurso kaj Zamenhoftago ĉe popola altlernejo de Frankfurto ĉe Majno

Jam la duan fojon en 2019 (post sukcesa unua kurso en majo) okazis Esperanto-kurso ĉe la ŝtata popola altlernejo de Frankfurto ĉe Majno. Aliĝis kvin personoj (unu junulo kaj kvar mezaĝuloj). Temis pri intensa kurso okazanta dum tri sabatoj en novembro kaj decembro. La kursanoj lernis la

bazojn de Esperanto kaj fine de la kurso jam povis legi kaj kompreni pli ampleksajn esperantlingvajn tekstojn je B1-nivelo. Dum la kurso okazis ankaŭ prezentado de Esperanta literaturo kaj komuna kantado de kristnaskaj kantoj en Esperanto. La 14-an de decembro (dum la lasta kursotago) oni komune spektis Esperantlingvajn filmetojn, aŭskultis modernan muzikon en Esperanto kaj manĝis (speciale por la kurso bakitajn) Esperanto-tortojn por festi la naskiĝtagon de L. L. Zamenhof. La ŝtata popola altlernejo de Frankfurto estas la plej granda tia institucio en la federacia lando Hesio kaj unu el la plej grandaj en Germanio ĝenerale. Danke al tio ankaŭ ĉi-foje la informo pri okazonta Esperanto-kurso atingis vastan publikon. Por la venonta somera semestro de 2020 jam estis anoncita nova Esperanto-kurso, okazonta en junio.



Martin PTASIŃSKI, estrarano de AGEI

D.R. Kongo

Zamenhof-tago: prelegoj, ekspozicio kaj koktelo.



Prelegoj okazis pri:

- ILEI, fare de s-ro Florent NTOTO, la sekciestro de Konga ILEI-SEKCIO,
- Vivo de Zamenhof, fare de s-ro Jackson MAFUILA, sekretario de DKEA kaj konsilanto ĉe ILEI Sekcio,
- Historio de Esperanto-movado, fare de s-ro Jean Bosco MALANDA, respondeculo pri financo ĉe ILEI-SEKCIO,
- Konga literaturo en Esperanto fare de s-ro Floribert BATANGU, Prezidanto de DKEA.

La tuta evento okazis en Esperanto kaj por esperantistoj.

Jean Bosco MALANDA

Kroatio

Esperanto en Kroatio

La esperantistoj en Kroatio memoros la jaron 2019 pro kelkaj gravaj eventoj, kiuj firmigis la rolon kaj certigis la sorton de Esperanto en ĉi tiu lando. En la tiea movado blovas freŝa vento de pozitiva publika opinio kaj bona renomo de Esperanto. Pri la agrableco de tiu vento povis konvinkiĝi ankaŭ la direktoro de UEA Martin Schaffer, kiu persone partoprenis en la plej gravaj aranĝoj dum septembro. La kroatia movado estas malgranda, sed tre aktiva. Ĝiaj aktivajoj fariĝas ĉiam pli publikaj kaj malfermaj al neesperantistoj, kio ebligas kompreni Esperanton kiel kulturalan fenomenon kaj forigi ĝiajn malnovajn agadformojn. Publikaj informiloj raportas pri Esperanto ĉiam pli ofte kaj pozitive.

En la aktivado elstaras la nordokcidenta regiono inter la urboj Bjelovar, Koprivnica, Đurđevac kaj Križevci. Du motoroj de tiea agado estas la Bjelovara esperantista societo kaj la Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac. Sian longegan tradicion de Esperanto Bjelovar festis septembre enkadre de la 7-a aranĝo Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo, kiu estas tradicia parto de la festado de la Tago de la urbo. La temo de la ĉi-jara (2019) aranĝo estis: 110 jaroj de Esperanto en Bjelovar.

La aranĝo konsistis el pluraj programeroj: en la Urba muzeo de Bjelovar estis prezentita ekspozicio *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*, kiun malfermis anstataŭantino de la departementestro, iama lernantino de Esperanto.

La 20-an de septembro en la Kafejo Zagorje estis malfermita pentraj-ekspozicio de Luca Cetinić, pentristino kaj esperantistino el Split.

Sabaton, la 21-an de septembro, okazis Festa kunveno, en kiu partoprenis la urbestro de Bjelovar, Dario Hrebak. En sia parolo s-ro Hrebak gratulis la Bjelovaran esperantistan societon, okaze de la 110-a datreveno de Esperanto

en la urbo. La societo ricevis la departementan premion Plakedo Trnski kaj la Sigelon de la Urbo Bjelovar pro sia multjara kultura agado.



En la kultura programo partoprenis la kultur-arta societo Golub, junaj violonistoj el la Muziklernejo Vatroslav Lisinski kaj kantgrupo de la Elementa lernejo Mato Lovrak. Dum la kunsido estis atribuitaj dankdiplomoj al la urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora kaj diplomoj por tri forpasintaj kaj tri vivantaj esperantistoj, kiuj elstaris per siaj aktivaĵoj dum la tuta historio de Esperanto en la urbo.

Historian projekcion dum la aranĝo prezentis Josip Pleadin, kiu aŭtoris ankaŭ la ampleksan plenkoloran kroatlingvan monografion: *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*.

Post farita komuna foto kaj vizito al la unua ZEO en la urbo, la Arbo de internacia amikeco, oni inaŭguris la duan ZEO-n: memortabulon al Vilim Polašek, la plej fama esperantisto en Bjelovar. Posttagmeze la programo okazis en la Hotelo Central. Krom solena tagmanĝo, tie okazis la 7-a Deklamkonkurso, en kiu partoprenis rekorda nombro da deklamantoj, eĉ 25.

Oni deklamis en tri kategorioj: elementlernejanaj, mezlernejanaj kaj studentoj, kaj



plenkreskuloj. La plej bona deklamanto el ĉiuj kategorioj estis la gimnaziano Magdalena Mesarov el Đurđevac.

La 22-an de septembro, la partoprenantoj veturis ekskurse al Đurđevac. Ili vizitis la fortikaĵon Malnova urbo. La ĉefa programero de la ekskurso tamen estis inaŭguro de la nova domo de *Dokumenta Esperanto-Centro*, kiun oni komencis konstrui en septembro 2017. Al la konstruado kontribuis pluraj Esperantaj institucioj kaj esperantistoj el kelkaj landoj. La memortabulon malkovris Josip Pleadin kaj Martin Schäffer. Tio estis realiĝinta sonĝo de Josip Pleadin, kiu iniciatis kaj gvidis la konstruadon de la domo.

Dokumenta Esperanto-Centro estas nacia Esperanta-arkivo de kroataj esperantistoj, al kiu pluraj vizitantoj ankaŭ tiun dimanĉon donacis valorajn materialojn. DEC estas ankaŭ grava Esperanto-eldonisto kaj organizanto de aranĝoj landvaste. La malfermo de ĝia nova domo estas epokfara evento, ĉar DEC estas la ĉefa portanto de „la tradicio de Esperanto en Kroatio”, kiu en februaro 2019 ricevis statuson de „*nemateria kultura havaĵo en la lando*” kaj estas notita en la respektiva registro sub la numero Z-7298. La 23-an de septembro en la popola biblioteko en Bjelovar, okazis solena prezento de la jam menciita monografio *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*, verkita de Josip Pleadin.

Se resumi la tuton, la jaro 2019 estis eksterordinare sukcesa por kroataj esperantistoj.

Marija JERKOVIĆ

Nederlando

Forpasis Mila van der Horst-Kolińska

Ni informas vin, ke la 13-an de decembro en maljunuldomo en Hago en sia 93-a jaraĝo forpasis la konata esperantistino Mila van der Horst-Kolińska, la „Patrino de Mazi”.

Mila naskiĝis apud Vilno, en la tiama Pollando, en 1927. Ŝi esperantistiĝis en 1960 kaj aktivis kiel esperantisto unue en la pola urbo Szczecin. En 1963 ŝi partoprenis en sia unua UK, interalie por ekkoni Andreon Cseh kaj lian metodon, por kies disvastigo ŝi poste dediĉis sian vivon. Mila geedziĝis en 1975 kun nederlanda esperantisto Gerard van der Horst kaj ekloĝis kun li en Hago.

En la sama jaro ŝi vizitis la Internacian Esperanto-Instituton, kie ŝi ekvolontulis kaj laboris dum preskaŭ 25 jaroj, ĉiutage organizante Cseh-kursojn, seminariojn, trejnadon de Cseh-instruistoj, aranĝante la heredaĵon de Andreo Cseh. Dum sia laboro en la iama Cseh-instituto ŝi kunordigis la realigon de la Esperanto-versio de la konata Mazi-kurso kaj lernmaterialo. Kun sia edzo ŝi partoprenis en multaj UK-oj, SAT-kongresoj kaj fervojistaj kunvenoj. En 1998 la nova estraro de IEI ne plu bezonis ŝiajn servojn. Tio kaj la baldaŭa forpaso de ŝia edzo fortranĉis Mila-n de la movado.



En 2013 ŝi ekhavis akcidenton en sia hejmo, kaj ekde tiu tempo ŝi malaperis el la movado. En la unuaj tri jaroj de sia malsano ŝi estis flegata hejme de Katalin Kovats kaj Sylvain Lelarge, kiuj ekde 2017 aranĝis por ŝi prizorgadon en maljunuldomo en Hago, kie ili restis ŝiaj solaj vizitantoj ĝis ŝia vivfino. Mila ĝis la lasta monato de sia vivo - krom en la pola - parolis ankaŭ en Esperanto, ĝojis aŭdi raportojn pri la multobliĝo de E-lernantoj.

Pri siaj vivspertoj kaj travivaĵoj ŝi mem verkis libron, en kiu ŝi detale rakontis pri siaj junaĝo, renkontiĝoj, amo kaj la graveco de Esperanto. La malboniĝinta sanstato de Mila malhelpis al ŝi verki la duan volumon de sia biografio, nome la memoraĵojn pri la jaroj en Nederlando, pasigitaj plene en la servado de Esperanto. La unuan volumon de la libro por postmorta publikigo ŝi konfidis al edukado.net, kies delonga subtenanto ŝi estis. La libro estas elŝutebla en la Dosierujo. Pri la vivo de Mila vi povas legi iom pli detale en la Panteono kaj samloke ankaŭ postlasi komentojn, memoraĵojn.

La cindrojn de Mila oni disŝutos en la maron la 10-an de majo, en la norda parto de Nederlando.

Mila van der Horst-Kolitska

PRI LA DESTINO

Biografaj notoj pri la celo kaj vojoj de mia vivo



Fonto: Katalin KOVATS (edukado.net)

Mia deziro por 2020 kaj por la 20-aj jaroj

de Jean-Claude ROY (Francio)

En 2019, la Nobel-premio pri ekonomio estis aljuĝita al sinjorino Esther Duflo kaj sinjoroj Abhijit Banerjee kaj Michael Kremer. Iliaj laboroj temas pri „malpliigo de malriĉeco” kaj specife pri la rolo de edukado tiurilate. Ilia konstato estas grava: helpi la idojn de plej malriĉaj homoj per trafa edukadsistemo kaj specifaj edukadprogramoj estas grava paŝo por eliri el la sakstrato de malriĉeco.

Kiun programon elekti por UEA kaj ĉiuj ĝiaj komponantoj en 2020 kaj dum ĉiuj 20-aj jaroj de nia moderna jarcento? Miaopinie ni precipe elektu la programon EDUKADO, do simple ni celu enkondukon de Esperanto en la edukadsistemojn ĉie en la mondo kie eblas, kaj iom post iom ni disvastigu la unuajn sukcesojn en aliaj landoj.

Kial en 2020 edukado, kaj en la sekvaj 20-aj jaroj? Ĉar mi opinias, ke temp’ esta! La premo de la angla lingvo estas tre forta en la mondo, kaj eble post kelkaj jaroj, tiu lingvo definitive venkos la batalon de la lingvo tutmonda, kaj do Esperanto definitive perdos ŝancon ludi sian gravan rolon cele al humana kaj paciga edukado. Ni ne forgesu la „internan ideon”, kaj la necesan pacpolitikon en nia mondo! Krom eble ene de Eŭropo, la streĉiteco de la tutmonda politika situacio estas tre forta, kaj ekzistas granda risko de plia tutmonda milito. Ni pensu pri la potencaj armeoj en la mondo kaj pri iliaj efikaj kaj mortigaj modernaj armiloj!

Kiel sukcesi? Kompreneble malfacilas. Se estus facile, ĝi estus jam atingita celo. Ekzistas jam sukcesaj agadoj en diversaj landoj, sed ne sufiĉas, kaj niaj nuntempaj diversfacetaj agadoj ne ebligas koncentri niajn agadojn tiukampe. Nuntempe, en 2020, por allogi la junulojn kaj iliajn gepatrojn kaj la edukadinstancojn, nepras krei interesajn pedagogiajn materialojn, kiel ekzemple videaĵojn, edukajn videoludojn por lerni la lingvon kaj samtempe amuziĝi. Miaopinie, instrui per eksmodaj materialoj (libroj ktp) ne taŭgas. Utiligante tiujn modernajn materialojn, la instruistoj pli facile interesos la junulojn, kaj la junuloj estos mense malfermitaj por lerni pri la humanaj aspektoj de Esperanto. Kompreneble por labori pri la unuigo de la homaro (la ĉefa celo) necesos organizi ĝemeligojn internaciajn.

Ĉu ni disponas pri la homfortoj en nia movado por krei tiujn materialojn? Eble jes! Jam ekzistas multaj bonaj filmoj en jutubo, bonaj programoj, bonaj apoj, kiuj interesas la junulojn. Ekzistas Duolingvo, kiu montriĝis efika.

Tamen, mi ripetas, temas pri enkonduko en la edukadsistemojn, kaj edukaj videoludoj ŝajnas al mi plej trafaj. Jam multaj instruistoj uzas tian materialon por diversaj instrufakoj, kaj ili klare interesas la junulojn en la klasĉambroj. Se ni ne disponas pri homfortoj en nia movado, necesas dungi kaj pagi fakulojn por krei tiujn materialojn.

Antaŭen! La nepoj nin benos!

La 53-a ILEI-Kongreso en Kanado



*La 53-a Internacia Kongreso pri Esperanto kaj Edukado okazos en **Kebekurbo** de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2020 kun komuna veturado al la 105-a UK en Montrealo poste.*

Daŭripova evoluo, ne vana vorto en la Universitato LAVAL

La Universitato LAVAL (UL) en Kebekurbo akceptos la 53-an ILEI-Kongreson en julio 2020. Tiu institucio havas tre precizan programon por zorgi pri malkreskigo de la rubaĵkvanto. Ni decidis sekvi tiujn postulojn, ĉar farante tion, ni povos havi pli malaltajn prezojn. Pro tio ni jam anoncas nun, ke vi devos kondukti laŭ precizaj ordonoj, kiuj ne ĝenos vian restadon, sed instruos al vi, kiel eblas redukti la rubaĵkvantojn. Estos interesa sperto por ni ĉiuj.

Kongresa programo

La partoprenantoj povos progresi per frekventado de lingvokursoj en du niveloj, komencantoj kaj progresantoj. Okazos Lingva Festivalo. Okazos diversaj prelegoj pri diversaj temoj. La Komitato kunvenos kaj ni esperu, ke ĝi estos decidpova havante kvorumon. La komenca frandvespero estas antaŭvidita kiel kutime: ĉiu partoprenanto alportu ion manĝeblan aŭ trinkeblan el sia hejma regiono.

Starigo de simpozio survojas. Ni scias, ke profesoroj de la Universitato Laval (UL) havas intereson prezenti al ni la lokajn indiĝenajn lingvojn kaj la

evoluo de la franca lingvo en sia provinco: Kebekio. Tre bona trafa ideo. Ni prezentos la evoluon de nia lingvo tra 130 jaroj de ekzisto kaj uzo. La vendreda simpozia tago aperas jam kiel grava kaj atentokapta evento. La loka lingvo estas la franca, do ni laboros uzante du lingvojn en tiu kunveno: la francan kaj Esperanton; ni scias, ke la franca estas la denaska lingvo de nia prezidantino.

Ligo al reta aliĝilo: <https://forms.gle/hgB3d1CntbsDKR8d8>

Jen la prezoj por loĝado en UL:

Unupersona, simpla cambio: \$65.60 = 45,25 EUR

Dupersona, samgranda ĉambro: \$76.20 = 52,60 EUR

"Supera" ĉambro, multe pli bela kaj granda (povas bonvenigi ĝis 4 personojn): \$120.80 = 83,40 EUR. (Estas apuda hotelo, Hotel Universel, sur la strato Chemin Ste-Foy. Vidu: <https://hoteluniversel.qc.ca/fr>)

Jen prezoj por manĝado:

matenmanĝo \$9 = 6,25 EUR

tagmanĝo \$11.25 = 7,80 EUR

vespermanĝo \$11.25 = 7,80 EUR

Tiuj prezoj estas por bufedoj, tuj apud nia salonego, por almenaŭ 50 personoj.

Kompreneble, estas pluraj aliaj lokoj sur la kampuso kaj apud ĝi, kie homoj povas manĝi.

Ekskursoj

Ni havos la okazon ekkoni la ravan malnovan Kebekurbon, tiom ĉarman. Ni vidos la altegan akvofalon Montmorency. Plie ni veturos al indiĝena vilaĝo kaj povos malkovri la vivon de unu el la multnombraj Unuaj Nacioj de Kanado. Ni provas nun organizi renkontiĝon kun la partoprenantoj de la antaŭkongresa ekskurso de la UK.

Tuttaga ekskurso T1

Vizito kaj tagmanĝo en indiĝena vilaĝo, vizito al akvofaloj, buso.

Prezo: 45 EUR

Duontagaj ekskursoj al la malnova urbo:

D1 "alta" parto de la malnova urbo, 2-hora vizito

Publika transporto kaj profesia ĉiĉeronado. Prezo: 15 EUR

D2 "malalta" parto de la malnova urbo, 2-hora vizito

Publika transporto kaj profesia ĉiĉeronado. Prezo: 15 EUR

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (prez.), Mireille Grosjean (vicprez.), Mónica Molnár, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu.

Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Rob Moerbeek.

Kontrolo: Simon Smits, Orlando Raola.

Lerneja: Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill. Estrare: M. Grosjean.

Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny. Estrare: Mireille Grosjean.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Radojica Petrović, Kristin Tytgat, Vicente Manzano Arrondo. Estrare: Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 14)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, zsafia.korody@esperanto.de.

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la Jarlibron de UEA*

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Unika (Yuro Jung)**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Karina Oliveira**.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Mireille Grosjean**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**,

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Mireille Grosjean**.

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

Unesko (kun statuso de observanto): Rerezentantoj de ILEI: **Monique Arnaud** (ĉefdelegito), Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@aliceadsl.fr, **Jean-Pierre Boulet, Pascale Voldoire, Marie-Sylvie Julian, Emmanuel Desbrières**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 20 € en A-landoj (laŭ la malnova UEA-difino), **10 € en B-landoj kaj 2 € en C-landoj**, kun ricevo de 4 numeroj de *IPR* jare. Kun aliro nur al la reta versio de *IPR* membreco kostas 10 € por la A-landoj, 5 € por la B-landoj kaj 1 € por C-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan *IPR* kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 32 € kaj por B-landanoj 18 €. Abono de JA papera kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA reta kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande. Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al Vilĉjo (Bill) HARRIS, 4 Edgcomb Ct, Portland ME 04013, Usono. <ilei.kasisto@gmail.com>. Bv klare indiki la celon de via pago. La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de la nederlanda ILEI-banko aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: Por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 24 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Elisabethlaan 295, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, jozefo.nemeth@gmail.com, www.ilei.info/ipr/; tel: (+36-70) 931-0530.

Peranto de ILEI kadre de LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) estas Vjačeslav Suslov, rete: gloro59@yandex.ru. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE BEVERWIJK, Nederlando*, moerbeekr@gmail.com.

**Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2020,
redaktofinon por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2020.**

SEKCIOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl SELIMI,
Rruga Fortuzi, nd.9, h.1, ap. 3,
AL-1016 Tirana,
bselimi@gmail.com

Armenio: Lida ELBAKJAN,
Moldovakan 26/2, kv.52, AM-
375062 Erevan,
Lidaelb@yahoo.com

Aŭstralio: vakas

Barato: Arikapalli Giridhar
RAO, E 14 Good Earth Malhar
Mosaic, Kambipura, Kengeri
Hobli, Bengaluru 560060, India,
rao.giridhar@apu.edu.in

Belgio: Marc CUFFEZ,
Elisabethlaan 295,
BE-8400 Oostende,
flandrio@hotmail.be

Benino: ALOFA Jérôme
Charles, 04BP0672
BJ-Cotonou, Rep du Benin,
alofkarlo@yahoo.fr

Brazilo: Aristophio Andrade
ALVES FILHO,
Rua B-55, N° 85, Conj. B.
Bentes 1, Q. B-55, Benedito
Bentes, Maceió, AL, Brasil, BR-
57085-748,
esperantomaceio@yahoo.com.br

Bulgario: Mariana
GENCHEVA, Targovska 95,
BG-5180 Polski Trambesh,
maries972@yahoo.com

Burundo: Evariste
BIGIRIMANA, BP 170, BI-
Rumonge-Burundi,
bigevariste@gmail.com

Ĉeĥio: Jana
MELICHÁRKOVÁ, U Hřiště
398, CZ - 696 06 Vacenovice.
melicharkova@quick.cz

Ĉinio: WEI Yiubin „Jado”
Baiyangshujie Xiaoxue, Taiyuan
Shanxi, CN-030003,
ilei_xinio@163.com

Danio: Ileana SCHRØDER,
Vestavej 4, DK-2770 Kastrup,
ileana.schröder@mail.dk

Finnlando: Sylvia
HÄMÄLÄINEN,
F.E. Sillanpään katu 2 C 46,
FI-33230 Tampere,
sylvia.h@kolumbus.fi

Francio: Michel DECHY, 65
allée de la Crémaillère,
FR-59650 Villeneuve d'Ascq,
michel_dechy@hotmail.com

Germanio: Zsófia KÓRÓDY,
Esperanto-Centro,
Grubenhagenstr. 6,
DE-37412 Herzberg/Harz,
zsafia.korody@esperanto.de

Hispanio: Luis Eduardo
BERDOR REMON, Pablo
Iglesias 41, 4 B,
ES-50018 Zaragoza,
eduardo.berdor@gmail.com

Hungario: József NÉMETH,
Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász,
jozefo.nemeth@gmail.com

Irano: Ahmad Reza
MAMDUHI, Nr. 9 K. Iraj, Kh.
Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-
Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi,
IR-19166-13514 Tehran,
mamduhi@gmail.com

Italio: Luigia OBERRAUCH
MADELLA, via Prampolini 8,
IT-43122 Parma,
silkovojo@outlook.com

Japanio: ISIKAWA Tiekō,
Tate 1-6-6-103, JP-353-0006
Siki-si, Saitama-ken,
tiekosanjo_103@bj8.so-net.ne.jp

Katalunio: Rubén
FERNÁNDEZ ASENSIO.
C/ Latrilla 12, 1r 2a, ES-08912
Badalona, *ileicat@hotmail.com*

Kongo DR: MAFUILA
MAVOMO Jackson,
C/O DKEA, BP 1007 Kin
Limete Congo RDC,
mavomespero@gmail.com

Korea Resp.: PARK
Yongsung, 402-dong 1803-ho,
Hansol-Solpark Apt. 218
Samkye-ro, Gimhae-si,
Gyeongsangnam-do, KR-50887,
esabpark@korea.com

Kroatio/KEL: Marija
JERKOVIĆ, Jarunska 6,
HR-10000 Zagreb,
mjerkovic@net.hr

Kroatio/KEU: Svijetlana
AKIK, Franje Malnara 52,
HR-10000 Zagreb,
ilei@hes-keu.hr

Kubo: Gonzalo
COLLANTES GARCIA,
N.López 857(altos) e/ Barnada y
S.Lora.
CU-90100, Santiago de Cuba
eduardo.robert@infomed.sld.cu

Meksiko: Carlos
HERNÁNDEZ LOARCA, Arco
del Triunfo 2019-40 San Pedrito
los Arcos,
MX-76148 Querétaro México,
ilei@esperanto-mexico.org

Mongolio: Khorloo
TSERENDEJID, MN-
Ulanbatoro, distrikto BZD, 82-5,
tserenjd@yahoo.com

Nederlando: Robert
MOERBEEK,
Zwaansmeerstraat 48,
NL-1946 AE Beverwijk,
moerbeekr@gmail.com

Nepalo: Bharat Kumar
GHIMIRE, Nepala Esperanto-
Asocio, G.P.O. Box 10518,
Kathmandu,
nespa_bharat@hotmail.com

Norvegio: Anne Karin
BONDHUS, Morenefaret 8A,
NO-4340 Bryne,
akbondhus@jkn.no

Pollando: Magdalena
TATARA, ul. Grzegórzecka
74/4, PL-31-559 Kraków,
mtatara@gmail.com

Rumanio: Mihai TRIFOI, Str.
Principală, Bl.1 Ap.3, RO-
527116 Bixad/Jud. Covasna,
mihaitrifoia@yahoo.com

Senegalo: Assane FAYE, BP 1186 Rufisque, Senegal, damanemanu2000@yahoo.fr

Serbio: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36, RS-32000 Čačak, radojica.petrovic.rs@gmail.com

Suda Afriko: Emile MALANDA NIANGA, PO BOX 2787 ZA-Cape Town, emalandan@yahoo.fr

Svedio: Agneta EMANUELSSON, Carl Ugglas väg 6, SE-641 37 Katrineholm, agneta.emanuelsson@fro.se

Svislando: Charles RODUIT, rue de Chancheri 1, CH-1661 Le Paquier, charles.eo@roduit.info

Tanzanio: Mulele Samwel MBASSA, Box 25, Bunda - Tanzania. Poŝtel: +255786 819 767, +255758 176 722, mulelebassa@gmail.com

Togolando: ATTIOGBE-AGBEMADON B., Mensah, B.P. 39, Aneho, TG-Lomé, abiovamensah@yahoo.fr

Ukrainio: Nina DANYLYUK, pr. Sobornosti, 32, Log. 108 UA-43026 U. Lucyk, nina_daniljuk@ukr.net

Usono kaj Kanado: William B. HARRIS, 4 Edgcomb Ct, Portland ME 04013 USA, wb_harris@hotmail.com

Vjetnamio: Ngyuyen THI NEP, 70, B20A, Kim Lien, Dong Ha, VN-Hanoi, Ngyuynepa9cfl@gmail.com

REPREZENTANTOJ

Britio: Elizabeth STANLEY, Frome House, Frome Gardens, Stroud, Glos. GL5 4LE, UK, elistaros@hotmail.com

Ĉilio: Héctor CAMPOS GREZ, Casilla 903, CL-3340000 Curico, hecg@uea.org

Ganao: Alfred Kobina ARTHUR, P.O. Box TS 404, Teshie, GH-Accra, ctrcgh@gmail.com

Islando: Loftur MELBERG Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, lofturmsig@yahoo.de

Israelo: Luiza CAROL, str. Bnei Binyamin 53, apt 12, Netanya IL-4201997, luzacarol1947@gmail.com

Nigerlando: BOUKARI Ellias Illiassou, S/C de Kanguéy BP11936 Niamey, Niger, elliasdj@gmail.com

Pakistano: Adeel Mahmood BUTT, Ward No. 11, near M.C. High School, PK-39100 Nankana Sahib, adeelbutt84@gmail.com

Rusio: Svetlana SMETANINA, str. Budajskaja 13-35, RU-129128 Moskvo, svsmetanina@yandex.ru

Slovakio: vakas

Tajvano: Reza KHEIRKHAH, Chung Ching Road, No. 105, TW-Pingtung city, 900-73, rezamenhof@yahoo.com

Urugvajo: Sonia RISSO, Pascual Costa 3253 Apto 1215, UY-11700 Montevideo, sonry@adinet.com.uy

KONTAKTPERSONOJ

Argentino: Gabriel Enrique WAGNER, Misiones 1421, AR-3116 Crespo - Entre Rios, gwagner@digitaloffice.com.ar

Aŭstrio: Walter KLAG, Vieno, esperanto@chello.at

Bolivio: Leandra DIA RIOS, Calle Maria Estívariz No 290, Avenida Coronel Valdez Pasaje Zaratustra, Villa Pabón, Zona Central, mileis_7@hotmail.com

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta KULENOVIĆ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Haitio: Christine THEANO, Christ-Roi, Imp. Romane # 41, HT-6110 Port-au-Prince, christinetheano@hotmail.com

Indonezio: Ilia Sumilfia DEWI, Perumahan, Pejuang, Pratama, Blok L, no. 11, RT/RW 003/006, ID-Bekasi, Jawa Barat, ilia.dewi@gmail.com

Kenjo: Gilbert S. SIKALA, Chemomi Estate, P.O. Box 22, 30301, Nandi Hills, simiyugilbert@yahoo.com

Kostariko: Hugo MORA Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, tikoguanu@gmail.com

Litovio: Gražina OPULSKIENĖ, Obuoliuko 42, Mažeikiai LT-89312, grazopol@yahoo.com

Luksemburgo: Claude NOURMONT, 2 om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, moonmont@pt.lu

Nikarago: Uriel GURDIAN, Rpto. Shick 2da etapa, Iglesia adventista 1c O, 1c N. Casa G-32, Managua, Nicaragua, esperantonica@gmail.com

Portugalio: Luís LADEIRA, Rua Manuel Valadares, 10, 2E PT-2650-192 Amadora luisladeir@gmail.com

Slovenio: Peter GRBEC, Sv. Peter 142, SI-6333 Sv. Peter, peter.grbec@gmail.com

Srilanko: U.L.F.G. Zeiter PERERA, 197, Indivitiya Road, Hettigama, Jaela, Srilanka, zeiter.espero@gmail.com

Taĝikio: Firdaus SHUKUROV, Glavpochtamt, a.k. 135 TJ-734000 Dushanbe, komintel@yandex.ru; aet2005@yandex.ru

Turkio: Vasil KADIFELI, Ataturk mah. Turgut Ozal blv. Gardenya 2-1 D:21 Ataschir 34758 Istanbul/Turkey, vasilkadifeli@gmail.com

Venezuelo: Asociación Venezolana de E-o, Ricardo Coutinho, Apartado postal 47675, Caracas 1041-A, VE, venesperanto@cantv.net

Per viaj donacoj vi povas subteni la agadon de la Ligo. La UEA-konto de ILEI estas ilek-a.

